

Claude GACOND kun Michel FRÉSARD:
Saluton! aŭ Esperanto aŭtodidakte de Audrey Childs-Mee
Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986.03.08.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-165/Radiokasedo-165-86-6-A-1025-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-Saluton-au-Esperanto-autodidakte-de-Audrey-Childs-Mee.mp3>

Cl.- Parolas Claude GACOND kaj Michel FRESARD nome de Svisa Radio Internacia.

Niaj esperanto-staĝoj por komencantoj grupigas fakte tre heterogenan publikon. Dum kelkaj lernantoj estas fakte "eternaj komencantoj", kiuj venis kun la espero fine atingi pli kontentigan lingvokonon, aliaj estas pli malpli veraj komencantoj. Kelkaj eĉ ne scias, kiel oni diras "jes" en esperanto. Por tiu lasta kategorio da lernantoj, la libro "Saluton aŭ Esperanto Aŭtodidakte" de Audrey CHILDS-MEE, kiun eldonis TK-Stafeto en 1983, montriĝis la ideala labor-instrumento. Dum ni faras paroligajn ekzercojn kun la jam parolkapablaj lernantoj la tutkomencantoj esplore antaŭeniras en la lernolibro "Saluton!", kies programado kaj bildoj estas tiel lerte faritaj, ke sen aldonaj klarigoj la antaŭeniĝo okazas senpene. Tio vekas entuziasmon kaj legemon ĉe la lernantoj. La unua paĝo, kiu estas titolita kiel la libro "Saluton!" per dek bildoj instruas la vortojn viro, virino kaj la frazojn:

M.- La viro vidas la virinon.
La viro salutas la virinon.
La viron vidas la virino.
La viron salutas la virino.

Cl.- Sen nacilingvaj klarigoj, kiuj ne estas eblaj en internacia lernolibro, la lernantoj tuj komprenas la rolon de la litero 'n'. Kaj ili tuj avidas al la paĝo dua, kie la pronomoj 'li' kaj 'ŝi' anstataŭas la vortojn viro kaj virino. Restas la samaj bildoj. Ili legas kaj tuj komprenas:

M.- Li vidas ŝin.
Li salutas ŝin.
Lin vidas ŝi.
Lin salutas ŝi.

Cl.- Sur la tria paĝo ni vidas virinon, kiu tenas treege longan hundon, kies vosto estas treege mallonga. Troviĝas unue ripetigaj frazoj.

M.- La viro vidas la virinon.
Li salutas ŝin.

Cl.- sekvas la matematika signo de egaleco

M.- La virinon vidas la viro.
Ŝin salutas li.

Cl.- Ankoraŭ troviĝos dua egaleco antaŭ ol alvenos la vorto 'hundo' kaj la vorto 'longa':

M.- La virino vidas la viron.
Ŝi salutas lin.
La viron vidas la virino.

Lin salutas ŝi.

Cl.- Per tiuj egalecoj, kaj sen nacilingvaj klarigoj, la lernantoj tre bone komprenas la rolon de la finaĵo 'n' kaj ke la subjekto ne nepre antaŭas la verbon kaj la nesubjekton. Kaj nun ili same bone komprenos la sekvajn frazojn:

M.- Ŝi havas hundon. La hundo estas longa. Ĝi estas longa hundo.
Kion ŝi havas? Ŝi havas longan hundon.
La hundo havas voston. Ĝi havas voston.
Kion ĝi havas? Ĝi havas voston.
La vosto estas mal-longa.
La hundo havas mallongan voston.
Ĝi havas mallongan voston.
Kion ĝi havas? Ĝi havas mallongan voston.

Cl.- Tiel disvolviĝas la memesploro en la lernolibro "Esperanto Aŭtodidakte" de Audrey CHILDS-MEE, kiu estas inda produkto de la Cseh-Metodo modernigita. Tial tiu ĉi libro tiel bone integriĝas al la Moderna Cseh-Metodo, kiun oni praktikas en la esperanto-stagoj por komencantoj ĉe Kultura Centro Esperantista. Sed ni estas konvinkitaj, ke la libro "Saluton!" same bone konvenas por alitipa instruado. Se neniuj povas laŭvoĉe legigi la lernantojn, tiam kasedo estus bonvena. Ni ne informiĝis, ĉu la eldonejo jam produktis ĝin, ĉar ni neniam bezonis tiun helpilon. Ĉiam troviĝis progresantoj helpemaj al la tutkomencantoj por la kontrolo de la elparolo. Iom post iom tiu lernolibro fariĝas vera legolibro. Ŝlosilo konkludas ĝin kun la respondoj al demandoj de la esplora parto. Fine post-parolo, kies legon ni konsilas al la kursgvidantoj, estas legaĵo komprenebla al la lernantoj, kiuj traesploris kun la necesa atentemo la tutan libron. Konklude al nia recenza prezento, ni legas al vi erojn el tiu teksto:

M.- "Aliaj libroj havas ANTAŬ-PAROLON, sed mia libro havas POST-PAROLON. Kompreneble! Antaŭ-parolo estus nelegebla de studonto, sed ĉi tiu post-parolo estas facile legebla de studinto.

Kiam mi unue decidis verki lernolibron tute en Esperanto, same taŭgan por mem-lernantoj, kiel por tiuj, kiuj ŝatas studi kun la helpo de instruanto, mi sciis, ke ne tute sola mi faros la laboron. Plurajn kunlaborantojn mi havis; kelkaj el ili jam estis esperantistoj, sed ne ĉiuj, ekzemple Peter kaj Julie eklernis Esperanton per la unuaj paĝoj de la pretigata libro, kaj iliaj opinioj kaj ideoj multe helpis al mi decidi pri tio, kio estu sur la aliaj paĝoj.

Cl.- Sekvas dankoj al la kunlaborintoj, kiuj konkludiĝas tiel:

M.- "Nun mi dankas al vi, la studinto de la libro. Vin mi salutas kaj gratulas, ĉar vi tiel diligente studis, ke vi nun povas legi kaj kompreni ĉi tiun post-parolon. Mi scias, ke vi volas jam fari demandojn pri, kiel daŭrigi la lernadon de Esperanto, kaj kiel praktiki kaj uzi la lingvon.

Jen miaj respondoj:

Per aliaj lernolibroj, per legado de Esperanto-gazetoj (kun helpo de plena vortaro), kaj per korespondado, vi povas sola daŭrigi la lernadon kaj praktiki la lingvon; sed pli interese kaj, por praktiki la lingvon, pli bone estas renkontiĝi kun aliaj esperantistoj, ĉu ne?

Kiel trovi ilin?

Cl.- Sekvas utilaj konsiloj kun kontakt-adresoj. Tiel la aŭtodidaktoj ne restos izoluloj. La fermo de la libro ne signifos por ili eksongon pri la neekzistanta esperanto-mondo. La maltitola paĝo ne vane havas la surskribon "ĝis revido!", ĉar la studintoj havas la eblecon kontakti la esperanto-mondon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Ĉinio. Ni ne dubas, ke tiu lernolibro kontribuos al la redinamismigo de la Cseh-Metoda instruado. Dankal la inteligenta kaj tre bone programita laboro de Audrey CHILDS-MEE miloj da homoj sur la tuta tero povos aŭtodidakte aliri la internacian lingvon.

Pli kaj pli ekzistas la instrumentoj, kiuj ebligas vastskale instrui esperanton. Sed nur ili ne sufiĉos, por ke sukcesu vastskala instru-kampanjo. Ankaŭ necesas, ke la movado mem pretiĝu. Siatempe Andreo CSEH sukcesis en sia agado, ĉar en Arnhem kaj Hago lia instituto havis la kapablon asimili la novbakitojn. La gazeto "La Praktiko" instigis ilian legemon kaj agemon. Ni esperas, ke paralele al la eldono de modernaj instruiloj iom ĉie en la mondo ankaŭ moderniĝos la movadaj institucioj. En Svislando tiu fenomeno efektiviĝas kadre de Kultura Centro Esperantista, kiu sin pretigas vastskale helpi la esperanto-lernantojn. Sed pri ĉio tio ni tutcerte havos la okazon reparoli dum venontaj elsendoj.

M.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Michel FRESARD

Cl.- kaj Claude GACOND

M.- prezentis la lernolibron "Saluton" de Audrey CHILDS-MEE. Ĝis venontsabate.

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014